

# Gazeto Andaluizia

ANDALUZIO PER SI POR HISPANIO KAJ LA HOMARO




N<sup>o</sup> 19 \* 5-a JARKOLEKTO \* MAJO '88

D. L. N<sup>o</sup> 1106/88

# NEU

ANDALUZIA ESPERANTO - UNJIGO



JE LA SERVO DE LA  
DISVASTIGO DE LA  
INTERNACIA LINGVO  
EN NIA LANDO

# GAZETO

# ANDALUZIA

Fondita en 1910 de D. José Garzón Ruiz

Oficiala Organo de A.E.U.

EDITA - ELDONAS:

Asociación Andaluza de Esperanto  
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

"Inscrita en el Registro de Asociaciones  
del Ministerio del Interior del Estado -  
Español con el número 56173"

REDAKTOROJ:

Alberto Franco Ramirez	Seviljo
Andrés Martín González	Malago
J.M. Rodríguez Hernández	Kordovo

-----  
"La opinioj ĉi tie verkitaĵ apartenas nur  
al la subskribantoj"  
-----

Presita ĉe Torrox - Malago

Kompostado: J.Herrero

.....  
ENHAVO

Cefartikolo .....	3
Debato pri nia agado .....	4
Informoj .....	7
Libro-Servo de A.E.U. ....	9
Ankoraŭ pri mal-vortoj .....	10
Kiu estas la "Don KiĤoto" ...	11
Nun ni .....	12
711: Ĉu araba invado? Faktoj.	14
Curso breve de Esperanto ....	16
Lingvaj duboj .....	18
Esperanto kaj esperantistoj en la hispana poŝtmarkaro ...	19
Amuzaĵoj .....	22

.....

ADRESOJ  
-----

Grupo Esperanto  
Apartado 611  
14080 CORDOBA

Grupo Esperanto  
Apartado 3275  
29060 MALAGA

S.E.J.O.  
Avda. Reina Mercedes, 49 1ª  
41012 SEVILLA

Grupo Esperanto  
Facultad de Ciencias  
GRANADA

Asociación Sevillana de Esperanto  
Sol, 75  
41003 SEVILLA

Grupo Esperanto  
Apartado 13  
29770 TORROX

Grupo Esperanto  
I.B. "Julio Rodríguez"  
MOTRIL

Grupo Esperanto  
Mariano de Cavia 34  
LA LINEA

Grupo Esperanto  
Apartado 320  
JEREZ DE LA FRONTERA 11480  
.....



## TRE BALDAŬ

Alproksimiĝas la dato en kiu, laŭstatute, la tuta estraro de AEU dimisios. Car estas tre grava afero por la estonto de nia Asocio trafi la plej taŭgan teamon da personoj estrontaj ĝin, mi atentigas ĉiujn pri la neceso respondeci kaj ne preterpasi silente.

Estus tre facile memoriĝi pri la atingoj de AEU dum ties kvar unuaj jaroj. Spite al tio, ĉar la rezultatoj de niaj klopodoj evidentas, mi sparus superflujajn vortojn. Ci-maniere, eble mi agadas pli objektive.

Ciuj scias, ke, normale, en tiaj cirkonstancoj, publikiĝas kandidatoj. Iliajn nomojn oni devas diskonigi por ke la ceteraj membroj sciu pri la ekzisto de personoj pretaj posteni ĉe la estraro. La kandidatoj, siaflanke, devas prezenti agadplanon - mallongan agadplanon - pri tio kion ili celas atingi por AEU. Nur tiel eblos baloti respondece.

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo bezonas pliajn personojn kapablajn kaj pretajn labori serioze kaj senĉese por Esperanto. Krome, ĉiam utilas kaj konvenas plijunigi ĝin per aliaj opinioj, projektoj kaj agadmaniero. Konsekvence, mi petas ke ĉiuj ni akceptu la taskon elekti la plej taŭgajn estraranojn por ke AEU atingu siajn celojn. Tiel grave, tiel simple.

La venonta kongreso, tiu de Jerez, okazos tre baldaŭ. Tiam estos, oficiale, la dimisio de la nuna estraro. Tiam ankaŭ, oni elektos novan estraron por nova kvarjara periodo. Mi tre malĝojus se oni pruvus ke AEU ne interesas nin. Se nur malgranda procento da membroj balotus, la estonto de la Asocio ne estus tre kontentiga.

Tial mi petegas ĉiujn kandidatojn sciigi, kiel eble plej rapide, al la nuna estraro pri iliaj intencoj. Tiel eblos informi ĉiujn pri la afero. Tiel eblos baloti persone aŭ perpoŝte.

Alie, pro la fuŝado, difektiĝos la funkciado de nia Asocio.

Andrés Martín Gonzalez  
Prezidanto de A.E.U.



Kara samideano:

Por plibonigi nian E-agadon mi prezentas al vi ĉi tion. Bonvolu tralegi ĝin atente kaj informi al aliaj samideanoj pri ĝia enhavo.

Komentariu, proponu kaj sugestu kaj, pri ĉio, sciigu la Estraron de AEU, jen perletere, jen persone en la venonta Kongreso en Jerez.

FAKTOJ

\*\*\*\*\*

- Malmultaj personoj studas Esperanton en Andaluzio.
- Ankoraŭ malpli da personoj ĉeestas la klasojn ĝis la fino de la kursoj.
- Oni studas la lingvon; tamen oni forgesas ĝin kaj aperas la eternaj komencantoj.
- Escepte de la veraj esperantistoj, la parolantoj pri Esperanto nur eldiras sensencaĵojn.
- Amase oni akceptas E-on kvazaŭ utopion; praktike oni flankemetas kaj preterpasas ĉi lingvon.
- Ankoraŭ E-o estas nekonata de la plejmulto en Andaluzio.
- Mankas aktivuloj ĉe la Movado.
- Eklezioj kaj politikaj partioj preterpasas E-on.
- La aŭtoritatuloj ne kunlaboras efike en la disvastigo de Esperanto.
- Kvankam timeme pluraj kulturaj kluboj ŝatas kaj defendas E-on.
- Privataj entreprenoj en Andaluzio neniam helpas efike Esperanton.
- Post pli aŭ malpli daŭra partopreno, relative granda nombro da personoj forlasas la Movadon kaj eĉ forgesas la lingvon.
- Granda nombro da esperantistoj loĝantaj en Andaluzio ne apartenas al A.E.U.
- Sajne, Meza kaj Supera Kursoj interesas tre malmultajn samideanojn.
- Ankoraŭ tre malgrandas la nombro da partoprenantoj en niaj Kongresoj.



## ANALIZO

=====

### A) La fiasko ne devenas de E-o mem, sed de la esperantistoj:

- Oni laboras disige kaj sen antaŭvidita agadplano.
- Mankas libertempo por plibonigi sciojn pri E-o.
- Kiam oni klopodas serioze pri la plenumo de ajna projekto, oni sukcesas.
- Mankas E-instruistoj en Andaluzio.
- Abundas amatoroj; malabundas profesiuloj.
- Senelira cirklo: E-o ne disvastiĝas ĉar oni ne aplikas ĝin kaj inverse. Kompreneble, ni devas rompi la cirklon.

### B) Por rompi la cirklon:

- Ni agadu dudirekte: konigante kaj aplikante E-on en la komerca, socia, kultura, ktp medioj.
- Anoncojn, klarigojn, k.s. nepre oni aperigu en E-o (krom en alia lingvo, se necese).
- Utilas enkonduki kursojn de E-o en fakajn kaj nefakajn revuojn.
- Necesas aperigi tre gravajn verkojn, artikolojn, k.s. originale en E-o.
- Kombini la radioelsendon de la kursoj kun la aperigo de la koncernaj tekstoj en la gazetaro tre efikos.
- Tre urĝas la sonbendigo de la kursoj kaj ties disdono.
- Tre urĝas la estigo de perkomputilaj kursoj kaj ties disdono.
- Oni devas pliklopodi por la enkonduko de Gazeto Andaluzia en la publikajn bibliotekojn.
- Apliki E-on en Turismo. Ci-cele plenumi E-ekskursojn.
- Uzi E-on kiel pontolingvon por disvastigi en Hispanio elstarajn fremlandajn verkojn.
- Traduki en E-on. neesperantistajn informilojn.
- Ceesti E-o en la Universala Ekspozicio okazonta en 1.992 en Seviljo.
- Daŭre kaj pacience klopodi por ke E-o eniru en la sindikatojn, Ekleziojn kaj kulturajn kaj sportajn klubojn, krom en la politikajn partiojn.
- Dissendi perradiajn kursojn fare de radioamatoroj.

### C) Nia agado akordu en ĉi tiuj aksiomoj:

- Oni sukcesas laborante serioze kaj kunordige.
- Ofte estas danĝere piediri sur la stratoj por ĉeesti normalajn klasojn de E-o, ĉar kutime oni lecionas aŭ nokte aŭ sunkaŝiĝe. Tial tre utilas perradiaj kaj perkomputilaj kursoj.

- Neniu laboras efike, se li ne kapabliĝis antaŭe. Do, necesas plibonigi la sciojn pri E-o.
- Nia socio estas tre pragmatisma. Tial nepras apliki Esperanton seninterrompe en ĉiuj medioj (komerca, turisma, kulturaj, ktp, ktp.).
- La Registaro nur helpas E-on se tio interesas ĝin; ne altruisme kaj ankaŭ ne pro nia peto.
- Esperanto konsistigas taŭgan komunikilon de la pacigantoj.

Nun, mi atendas vian reagon kaj tiujn de la ceteraj samideanoj.

Sukceso kaj malsukceso tute dependas de ni mem.

Dankon!

La Prezidanto de A.E.U.





KORDOVO  
\*\*\*\*\*

- Jam estas en Kordovo alia esperantisto. Li nomiĝas Pedro Martín León. Post legi la artikolon "El Esperanto, cien años vivo" publikigitan de "CORDOBA", li ekkontaktis kun ni per nia poŝtkesto. Li nun lernadas esperanton pere de kelkaj metodoj kaj posedas fortan esperantistan spiriton.

Antaŭen, Pedro!

- La CASA DE LA JUVENTUD invitis nin kaj cedis al ni sian ejon por la okazigo de esperanto-klasoj, de la venonta monato septembro ĝis decembro. La klasojn gvidos nia samideano Pedro J. Gosálvez Olmo.

- Post la artikolo "El Esperanto, cien años vivo" pri kiu ni parolis jam, alia ĵurnalo, NUEVO DIARIO DE CORDOBA, publikigis longan dupaĝan artikolon pri la internacia lingvo, kun fotoj pri HEROLDO kaj kelkaj esperantigitaj verkoj. Malgraŭ ke la spirito de la artikolo estis, generale, favore al Esperanto, la aŭtorino verŝis lajn asertaĵojn tute nekorrektajn kaj eĉ insultantajn (pro la facileco de Esperanto, ni, geesperantistoj, estas homoj kulturpovraj) kiuj, kompreneble, estis objektoj de kontraŭdiro fare de kelkaj kordovaj samideanoj.

- Nia loka grupo, kiel ni antaŭanoncis pasintnumere, jam estas fine ellegigita.

- El BAENA, kordova vilaĝo, alvenas al ni malgaja novaĵo: la forpaso de nia kara samideano Fernando de la Torre, unu el la unuaj esperantistoj en nia provinco. Ripozu pace!



## ESPERANTAJ GRUPOJ EN HISPANIO

- \* ALCIRA: Gr. Esp. Sr. Domínguez, Avda. Carcaixent, 23
- \* ALCORCON: U. Popular Gr. Esp., Virgen de Iciar, 17
- \* ALCOY: Antulio Asensí, Joaquín Sorolla, 6, 10.\*
- \* ALICANTE: Grupo Esperanto, Sta. Cruz de Tenerife, 4
- \* ALICANTE: Grupo Esperanto, S. Fernando, 39
- \* ASPE: Angel Miralles, Av. Madrid, 41
- \* BENIFAJO: Grupo Esperanto, Nueva, 23
- BARCELONA: Hisp. Esp. Instituto, Apartado 2428
- BARCELONA: Jun. Esp. Kataluna A, Apartado 23484
- BARCELONA: Barna. Esp. Centro, Carreras Candi, 34-36
- \* BARCELONA: Esp. Peko. Fom. Martí, Provenza, 595
- \* BARCELONA: Centre Com. Lleideta, Gran Via, 592, 1, 2.\*
- \* BARCELONA: H. E. Fervujista Asoc., San Antonio, 46-50-2
- \* BARCELONA: Kataluna Esp. Asocio, Apdo. 32318
- BARCELONA: G. E. «Aurora», Malloca, 580
- \* BARCELONA: Amica UNESCO Esp., Mallorca, 207
- BILBAO: Grupo Esperantista, Barrencale Barrena, 2
- \* BURJASOT: ARBO As. Radiomatoru, Apartado 25
- BURJASOT: Esperanto Rondeto, Concepción Arenal, 10
- CALLOSA DE SEGURA: Gr. Esp., Queipo de Llano, 18
- CALLOSA DE SEGURA: H. A. Laboristaj E. G., Primo de Rivera, 6
- CARTAGENA: Gr. Esp. Cartago Nova, Juan Fernández, 13
- CASTELLDEFELS: Gr. Esp. A. Einstein, 1, 1.\*, 3.\*, B
- CORDOBA: Gr. Esp. «IB Séneca», Av. Menéndez Pidal, sin.
- CORDOBA: La Kordova Esperantista, Apartado 611
- CHESTE: Ateneo Cul. Esp., Antonio Machado, 6
- CHESTE: G.E. «Luznordio», Blasco Ibáñez, 28
- CHESTE: G.E. «Eisenhof», Universidad Laboral
- ELCHE: Grupo Esperanto, José Santos Orts, 5
- GIJON: Astura Esp. Asocio, Enrique Cangas, 25
- GIRONA: Girona Espera, Apartado 509
- \* GIRONA: Skolta Esp. Gr., Apartado 638
- \* GRANADA: Grupo Esperanto, Facultad Ciencias
- \* JEREZ FRONT.: Gr. Esp., Inst. «Padre Coloma»
- LA LAGUNA: Soc. Esp. ESTO, Apartado 53
- \* LA LINEA: Gr. Esp., Mariano de Cavia, 34
- \* LEON: Gr. «Verda Leono», Colegio S. Juan de la Cruz
- \* MADRID: A. Ruiz «Nueva Era», Villabona, 1, 1.\*, A
- \* MADRID: Clases Esperanto, Maestro Alonso, 6
- MADRID: Amikaj de UNESCO, Pza. Tirso de Molina
- MADRID: Liceo Madrileño Esp., Atocha, 98, 4.\*

- MALAGA: Grupo Esperanto, Apartado 3275
- MALAGA: Andalucía Esp. «Unigo», Apartado 3275
- \* MALAGA: S.E. C. Cultural G.F.U., Trinidad Grunt, 28, 2.\*
- MANRESA: Esp. Fako Genva Doma, Circumvalarió, 60
- MANRESA: Lingua Club, S. Joan Bta. la Salle, 2
- \* MATARO: Gr. Esp. Sr. Juliá, C. del Parc, 86, baix
- MOIA: Grupo Esperanto, Forn, 99
- MOLLET DEL VALLES: Gr. Esp., Ronda d'Orient, 8, 4.\*, 4.\*
- \* MOTRIL: Gr. Esp. «J. Rodríguez»
- MURCIA: Gr. Esp. R. Codorniu, Sta. Teresa, 16
- \* NOVELDA: Gr. Idioma Esper., Gaya, 58, 3.\*, C
- \* ORIHUELA: Gr. Idioma Esper., S. Gregorio, 25, 1.\*
- SABADELL: Ass. Cultural Esp., Montseny, 5, 1.\*
- SABADELL: Centro de Esperanto, Apartado 407
- SABADELL: Esp. Gr. «Antón Bal», Font Nova, 32
- \* SABADELL: Grupo de Esperanto, Avda. 11 Setembre, 59
- S. COLOMA DE GRAMANET: E.C. Excursionista Sant Josep, 1
- S. COLOMA DE GRAMANET: Esperanto Grupo, Sant Josep, 2
- S. CUGAT DEL VALLES: G.E. «Josefo Anglés», Apartat 336
- S. PAU D'ORDAL: Hisp. Esp. Museu, Dr. Zamenhof, 12
- S. PAU D'ORDAL: Grupo Esperanto, Carrer de Ponent, 16
- \* S. SADURNI D'ANOIA: Gr. Esp., Forn, 19
- SANTANDER: Asoc. «Cintabro de Esp., C. Alonso Vega, 20, 7, A
- SANTIAGO DE COMPOSTELA: Gallega Esp. Asoc., Apartado 7
- \* SANTIAGO DE COMPOSTELA: Gr. Verda Stejn, Santa Mari
- \* SANTIAGO DE COMPOSTELA: Grupo Esperanto, La Rosa, 1
- SEVILLA: Esperanto Asocio, Sol, 75
- SEVILLA: ILET M. López Hdez., Sol, 75
- \* SEVILLA: S.E.I.O., Pozo, 3
- TERRASA: Juventud Esperantista, San Mariano, 122
- \* TERRASA: Secció Esp. G. Filat., Rambla d'Egara, 340, 2.\*
- TERRASA: Tinnonda Esp-Grupo, Apartado 313
- TERRASA: Kultura Asocio Esp., Ptgs. Gaudí, 13
- \* TORROX: Grupo Esperanto, Apartado 13
- VALENCIA: Grupo Esperanto, O.V. Fdo. el Católico, 45
- VALLADOLID: G.E. «Fido kaj Esp», Apartado 119
- VIGO: G.E. «Paco kaj Amo», Príncipe, 44
- VITORIA: Alava Esp. Asocio, Pl. Zaldiarán, 1, 6.\*
- ZARAGOZA: Esp. Soc. «Fraterco», S. Vicente de Paúl, 1
- ZARAGOZA: Esp. Tur. Ints. Gastón, Paseo Constitución, 35, 4
- ZARAGOZA: Katolika Esp-Asocio, Fray Luis Amigó

\* NE ALIĜINTAJ AL HISPANIA ESPERANTO-FEDERACIO

## HISPANAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO

1.*	1920	Barcelono	26.*	1965	Palencia
2.*	1921	Zaragozo	27.*	1966	Bilbao
3.*	1923	VALENCIO	28.*	1967	Zaragozo
4.*	1924	Bilbao	29.*	1969	La Laguna
5.*	1925	Kordovo	30.*	1970	Mieres
6.*	1926	Madridro	31.*	1971	ALICANTE
7.*	1928	Seviljo	32.*	1972	Vigo
8.*	1929	Oviedo	33.*	1973	Madridro
9.*	1932	Madridro	34.*	1974	Valladolid
10.*	1933	Santander	35.*	1975	Lérída
11.*	1936	Barcelono	36.*	1976	El Ferrol
12.*	1951	Tarrasa	37.*	1977	Sabadell
13.*	1952	VALENCIO	38.*	1978	León
14.*	1953	Bilbao	39.*	1979	Gijón
15.*	1954	Zaragozo	40.*	1980	Madridro
16.*	1955	Gijón	41.*	1981	Murcio
17.*	1956	Barcelono	42.*	1982	Málaga
18.*	1957	Madridro	43.*	1983	Zaragozo
19.*	1958	CASTELLON	44.*	1984	Seviljo
20.*	1959	Málaga	45.*	1985	Kartageno
21.*	1960	Pontevedra	46.*	1986	Vigo
22.*	1961	Majorko	47.*	1987	Madridro
23.*	1962	Valladolid	48.*	1988	VALENCIO
24.*	1963	Barcelono	49.*	1989	Bilbao
25.*	1964	VALENCIO			



T I T U L O	PRECIO
<u>Diccionario de Bolsillo</u> (Esperanto-Español y Español-Esperanto, de Editorial Sopena, 382 págs.) .....	400,—
<u>Diccionario Esperanto-Español</u> (E.Tudela, 175 págs.) .....	675,—
<u>Parolu E-on</u> (Curso elemental de Esperanto en comics. Formato grande. Portada a color. 50 págs.) .....	475,—
<u>Curso Medio de Esperanto</u> (Apuntes en esperanto sobre "Historia del Movimiento, Historia de la Literatura y Gramática") .....	450,—
<u>El Esperanto</u> (Libro de consulta en castellano) .....	475,—
<u>Privilegia Vojo</u> (Libro de texto en esperanto) .....	550,—
<u>Historio de Esperanto</u> (Historia del Esperanto, en 3 volúmenes) .....	1.950,—
<u>Pandemonio</u> (Primer libro editado por la Asociación Andaluza de Esperanto. Contiene obras premiadas en los Concursos anuales de la Asociación Universal de Esperanto) ..	650,—
<u>La Familio de Pascual Duarte</u> (de Camilo José Cela, 166 págs.) .....	600,—
<u>Sanga Nupto (Bodas de sangre) y</u> <u>La Domo de Bernarda Alba (La Casa de Bernarda Alba.</u>	875,—
<u>Sentempa Simfonio (poem-antología hispana)</u> (Fernando de Diego, 157 págs.) .....	600,—
<u>La kraboj kun oraj pinĉiloj</u> (Aventuras de Tin-Tin en esperanto) .....	875,—
<u>La Nigra Insulo</u> (Aventuras de Tin-Tin en esperanto) .....	875,—
<b>CASETS MUSICALES</b>	
<u>Amplifiki grupo de rock interpreta TUTE NE GRAVAS</u> .	1.250,—
<u>Horo da opozicio. Canta Gianfranco Molle.</u> .....	1.000,—
<u>Per nia nura vol</u> . Canta Suzanna .....	1.175,—
<u>La Vojo. Canta G.Molle</u> .....	1.000,—
<u>Dangera ul.</u> Canta Marĉela .....	1.000,—
<u>Venos Liber.</u> Canta Marĉela .....	1.100,—

NOTA: En estos precios no va incluido el gasto de envío.

PEDIDOS: Asociación Andaluza de Esperanto, Apartado 3275, 29080 MALAGA.

# ANKORAŬ PRI MAL-VORTOJ

Jen informo pri la sinteno de Plena Analiza Gramatiko de Esperanto (de K.Kalocsay kaj G.Waringhien) antaŭ la prefikso "MAL-": Senco kaj uzo. Ĝi estas prezento sen polemika celo, nur instrua: Ĝi taŭgu por tio, ke oni pli multe konsciu pri anguloj en la lingvo por ĝin posedi pli libere.

Baza signifo de mal- estas rekta kontraŭo. Tiun signifon ĝi konservas ĝenerale kaj ankaŭ kiam uzata memstare. Ekzemploj: malvarma, malami, malsupre, malamiko, mala, male, malo.

Kelkfoje ĝi povas esti pli emfaza "ne": neafabla - malafabla; neglata - malglata. Foje ĝi povas formi paron kun sen-: maltaŭga - sentaŭga. Sed tiam mal- ŝajnas pli forta kaj emfaza, se ne paroli pri faktaj signifodiferencoj. La aŭtoro rekomendas ke oni evitu mal-kunmeton de radikoj, kiujn ili konsideras tre "penetremaj", tio estas, ekstrem signifaj: malabomeni (Sategi), malgiganta (pigmea, nana).

Ili ankaŭ prezentas jenajn malavantaĝojn de tiu "ekstreme utila kaj tial oftege uzata prefikso":

- 1) Vortoj fariĝas tro longaj, minimume trisilabaj.
- 2) Kiam ĝi tro amasiĝas en frazoj, ĝi donas monotonan efekton (kiel, cetere, ĉiu alia vorto aŭ vortero ĉe troa ripetigo).
- 3) Ĝi povas kaŭzi rompon de la akcentregulo se oni emfazas malecon per prononcado.
- 4) "Mal-vorto ne povas havi tian esprimvaloron kiel radik-vorto... apud ĉi tiuj la mal-vortoj estas pli klarigaj ol esprimaj".

Apud ĉi tiuj subjektivaj argumentoj, kaj ŝajne preterpase, oni aludas objektivan, pli konvinkan: La mal-vortoj "povas kaŭzi eĉ akcidenton per la miskompreno de komandoj, kiel: "turnu (mal)dekstren!", "Tiru (mal)supren!", kriataj el malproksimo aŭ en bruo", kiel fakte jam okazis.

Malgraŭ ĉio ĉi "En la komuna lingvo la menciitaj malavantaĝoj ordinarne ne estas gravaj, sed tiom pli en la poezio". Tamen literaturo pli proksimas al tradicio ol al logiko, kaj teoria pritraktado rapide atingas sian maksimuman lumigivon.

En P.A.G. aperas diversepokaj ekvivalentoj de malvortoj. Mi ŝatus fini ĉi tiun prezenton per listo ĉerpita el la Fundamenta Universala Vortaro, do kun vortoj kiuj jam de la komenco (daŭrigas sur paĝo 11a)



## KIU ESTAS LA "DON KIHOTO DE ESPERANTO?"

Tion demandis jam pluraj. Tamen por scii kiu povas esti la klasika verko de la Esperanta Literaturo eĉ fakulo malsufiĉus; des malpli povas pretendi amatoro adekvate gvidi tra tiu kampo.

Mi opinias, ke tia verko ankoraŭ ne ekzistas (kiom longe devas vivi literaturo antaŭ ol ĝin produkti?). Nur atentu jenajn kandidatojn:

Unualoke, La infana raso, de William Auld. Poemo en 25 ĉapitroj. Aliaj, sed malpli elstaraj, estas jenaj romanoj:

Kiel akvo de l'rivero, de Raymond Schwartz.

Vojaĝo al Kazohinio, de Sándor Szathmári.

La granda kaldrono, de John Francis.

Feliĉe por la demandintoj, en la Jubilea Universala Kongreso en Varsovio estis decidite, ke speciala komisiono de EVA (Esperantlingva Verkista Asocio) proponu la titolojn de la plej valoraj Esperanto-verkoj, por elekti Esperantajn klasikaĵojn. Tiam do ni povos scii, kiuj estas "Oficialaj Don Kiĥotoj" de nia originala literaturo.

Rikardo F.A.R.

Rekomendinda legaĵo: Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto, de William Auld. 1979.

#####  
(daŭrigo de la paĝo 10a)

de Esperanto ekzistas kiel apartaj radikoj: fini = malkomenci; forgesi = malmemori; manki = malesti; morgau = malhierau; morto = malvivo... Kial halti tie? Nu, eble surmeza vojo troviĝas virto.

Rikardo F.A.R.

Por legi plue:

Kompreneble, Plena Analiza Gramatiko de Esperanto mem. Utila estas ankaŭ la lingvistika parto de El Esperanto, de Pierre Janton (hispanlingve). Tie vi trovos pliajn bibliografiajn indikojn. Interesaj ĉiam estas Akademiaj studoj, de la Akademio.

#####



# NUN NI



\*\*\*\*\* JUNULARA ALDONAJO AL GAZETO ANDALUZIA \*\*\*\*\*

\* ANDALUZIA ESPERANTO-JUNULARO, AEJ, ekkontaktis en Seviljo kun la junulara departemento de la Kultura Fakoj de la Andaluzia Registaro, kun la celo enlistigi nian asocion en la registro de andaluziaj junularaj asocioj. Ĉi tiu registro estas tre grava ĉar ĉi tiel ni ade rilatiĝos kun la oficialaj instancoj de Andaluzio.

\* Kune kun tiu supra informo, ni diros ke AEJ unuafoje en sia mallonga vivo, petis subvencion al la Andaluzia Registaro. La pasintan monaton Majo la prezidanto de AEJ prezentis ĉe la Kultura Fakoj peton pri mona helpo (ĝuste 650.000 ptojn.). Ni jam scias ke ni ne atingos ĉi altan mon-kvanton, tamen nia celo estas ricevi sufiĉan kvanton por aĉeti fotokopi-aparaton por AEU/AEJ. Ĉi tiaj subvenci-petoj ripetiĝos ĉiuj jaroj en la monatoj majo kaj novembro.

\* La Estraro de AEJ decidis oferti al ĉiuj junaj membroj de nia asocio la aĉeton de Esperanto-libroj pagante NUR la duonon de la prezo. Jes! sciu ke se vi estas membro de AEJ kaj jam pagis la kotizon de 1988, vi rajtas aĉeti unu el la jenaj libroj (aŭ ambaŭ) po la sekvanta kosto:

- "Nuevo Método de Esperanto", de F.Diego = 500,- ptoj.
- "Parolu E-on", en comics, de J.Arroyo = 250,- ptoj.

La alian duonon AEJ mem pagos. Ĉiu membro rajtas dum 1988 aĉeti unu aŭ ambaŭ ekzemplerojn. Vi povas peti ilin aŭ havi pliajn informojn pri ĉi oferto, skribante al AEJ, Apartado 611, 14080 Córdoba, aŭ pli rekte telefonante al 954-415854 (de la 4,00 ĝis la 8,00 vespere de lundo ĝis ĵaŭdo).

Vi krome nur devos pagi la sendokostojn (proksimume 50 ptojn.). AEJ decidis lanĉi ĉi oferton por faciligi la aĉetadon de E-libroj al la junaj andaluziaj geesperantistoj kaj la lernadon de nia lingvo. Ĉiujare ni ripetos ĉi oferton kun aliaj libroj. Do, kion vi atendas?

## HISPANE (EN ESPAÑOL):

!!!OFERTA!!! Para todos los miembros de AEJ (es decir, miembros de AEU menores de 30 años, al corriente del pago de sus cuotas). AEJ ofrece la adquisición de los dos libros siguientes, a la mitad de su costo en el mercado, la otra mitad será pagada por AEJ:

- "Nuevo Método de Esperanto", de F.Diego = 500,- ptas.
- "Parolu E-on", en comics, de J.Arroyo = 250,- ptas.

Para solicitar tu pedido o para obtener mayor información sobre esta oferta, escribe a AEJ, Apartado 611, 14080 Córdoba. O más directamente telefona al 954-415854, de 4 a 8 de la tarde, de lunes a jueves.

Aprovecha esta oferta. AEJ pone a tu alcance dos métodos modernos de aprendizaje del Esperanto para completar o iniciar tu biblioteca. Todos los años AEJ ofrecerá a sus miembros uno o varios títulos bajo estas condiciones.





Pro la jusa fiasko de la hispana futbal-teamo okaze de la Eŭropokalo 88 okazita en Germanio, la Hispana Futbal-Federacio decidis forigi la respondeculon de la teamo Mikaelo Munjoz' (Miguel Muñoz poramike). La Futbal-Federacio multe cerbumis pri ĉi afero kaj post longaj disku-

toj decidis nomumi novan respondeculon. Jes! li estos nia amiko Alberto Franco, kiu jam majstre regis la teamon "Esperanto Risko" en la urbo Seviljo. Ni esperas ke Alberto, pli konata futbaletoze kiel "la Gullit de la strato Sun'" helpos atingi por nia lando multajn futbalkokalojn.

La foto montras al ni la mienon de unu el la membroj de la nacia teamo post koni tiun gajan novaĵon.

\*\*\*\*\*



**SILENTU!**

**ĈI TIE DORMAS INFANO**



\*\*\*\*\*



## 711: ĈU ARABA INVADO? LA FAKTOJ.

Informoj ĉerpitaj el "Islamo en Okcidento. Kordovo, ĉefurbo de unuisma pensado." de Roger Garaudy (prononcu roĝe' garodi').

Averto: Roger Garaudy estas islamano. Do eble multaj neislamanoj povas pensi, ke tio blindigas lin antaŭ la realo. Nu, jen liaj vortoj: al vi la decido, ĉu li pravas.

- - - - -

Se Mohamedo bezonis 22 jarojn kaj 19 militirojn por konkerti la tutan araban duoninsulon, kiel klarigi, ke islamanoj en malpli ol tri jaroj gajnis la iberian duoninsulon por Islamo? Diferencoj estas jenaj: Dum Arabio estis plurdiisma, "senleĝa" lando, Hispanio estis kristana, kun grava ariana konsisto, kaj grandaj judaj komunumoj.

Sajne, en Hispanio okazis interna milito inter kristanoj akceptantaj kredon pri triunueco de la Dio kaj pri dieco de Jesuo, kiel difinite kaj proklamite ĉe la Koncilio de Niceo en la jaro 325, kaj kristanoj rifuzantaj tian triunuecon, por kiuj Jesuo estis ne la Dio, sed unu el ties profetoj. Post tiu milito okazis kultura ŝanĝo, kiu daŭris unu jarcenton kaj duonon.

Islamo disvastigis fulmrapide kaj ĝenerale pace, kie ajn judoj kaj "herezaj" kristanoj formis plimulton ("herezo" estis io ajn ne konforma kun la decidoj de Niceo). Kial? Nu, la korana revelacio difinas Islamon ne kiel novan religion, sed kiel la fundamentan, unuan religion. Ĝi signifas paciĝon (antaŭ la dia volo). Ĝi konfirmas la antaŭajn profetojn kaj purigas ties mesaĝojn de historiaj misformaĵoj, komplemente kaj kompletige. Tiurilate, judoj kulpus pri ekskludado kaj akaparado de universala mesaĝo; kristanoj erarus identigante kaj kunigante Jesuon kun sama naturo kiel la Dio, kio ŝuldiĝus al traduko de la kristana sperto pri amo en la lingvaĵon de greka filozofio. Do Islamo prezentigis universale alloga, ligita al neniu aparta tradicio; ne kiel rompo, sed kiel konfirmo kaj klarigo per pli facilaj vortoj. Mohamedo estis plia ĉenero en longa vico, kie elstaras Abrahamo, Moseo, Jesuo kaj aliaj.

En Iberio ekzistis de pluraj jarmiloj opono inter unudiismo de spirita elito kaj popola plurdiismo (kiu, laŭ islamanoj, daŭras ĝis hodiaŭ: naciismo, kapitalismo, seksismo, superismo, ktp.). Norde kaj mere regadis hindeŭropa tradicio de perantoj kaj plurismo. Sude, precipe en la nunaj Andaluzio, Murcio kaj Badajozo (ĉu koincido kun la politika grupo "Andaluzia Liberigo"?), oni povis trovi unuisman tendencon, jen en semida formo (disvastigita de la juda "dispelitaro"), jen en gnostika formo, kun konstatebla aleksandria influo (el Egiptio) per kartaganoj kaj berberoj, kio glate kaj facile kondukus antaŭ la koranan predikon kaj ties neceseman unudiismon.

La romia imperiestro Konstanteno, por atingi ideologiajn kaj religian unuecon (ĉu vi rekonas tian konduton? mi ne kritikas nun la celon, sed certe la rimedojn), vokis koncilion en Niceo (jaro 325). Kiu unueco ne estis atingita, ĉar oni proklamis dogmon pri triunueco kaj pri samsubstanceco de Jesuo kaj la Patro, kaj provis ĝin altrudi. Tio disigis la kristanojn. Kiu ajn ne akceptis la novajn dogmojn kiel nepre kaj certverajn, tiu estis konsiderata "herezulo" kaj persekutata.



La imperiestra decido naskis svarmon da "herezoj". Inter ili arianismo akceptis Kriston kiel nekreitan Parolon de la Dio.

Islamo disvastiĝis rapide tra Proksima Oriento. Islamanoj estis akceptitaj kiel liberigantoj. Tio daŭris ses jarojn, malgraŭ tio, ke la arabajn armeojn superis tiuj de la najbaraj imperioj laŭ teĥnika nivelo, armilaro, kvanto kaj disciplino. Tian bildon pri liberigo pentras Mikaelo el Sirio en sia "Kroniko". Ankaŭ la katolika pastro Asin Palacios estas konsultinda.

Laŭ la historiisto Dozy ("Historio de la hispaniaj islamanoj") ĉi tie impostoj malaltiĝis, kaj terlaboristoj ekposedis siajn agrojn; komercado liberigis de limigoj kaj impostoj; sklavoj povis aĉeti sian liberon.

Laŭ Blasco Ibañez ("Ombro ĉe katedralo") tio estis civilizigado kaj episkopoj-militistoj. La rezulto estis la plej bela, riĉa civilizo en la mezepoka Europo: dum la Nordo sangis pro religiaj militoj, Hispanio superis la tian kolosan kvanton de 30 milionoj da loĝantoj el ĉiuj rasoj kaj kredoj.

Cio ĉi ne ŝajnas kongrua kun invado. Plurfoje flamis kvereloj inter katolikoj kaj arianoj; foje ankaŭ pure hispanaj "herezoj" aŭdiĝis, kiel priscilianismo, adoptismo... Nu, ekzistis visigota provinco en norda Afriko (nuna Rif-lando). Do oni retrointerpretas iaman kverelon, helpopeton de la filoj de Vitiza, arianoj kontraŭ la triunuisma uzurpinto Rodrigo, kiel invadon, eble por establi miton pri katolika, senkulpa Hispanio atakita de malicaj islamanoj. Fakte, ŝajnas, ke oni ne atentis pri Islamo dum unu kaj duona jarcentoj, ĝis Sankta Eulogio el Kordova sciigis ĉirkaŭ 850 pri Mohamedo kaj pri la Nobla Korano! Ĝis tiam nur teologoj atentis pri "herezoj" kaj kontroversoj. Eĉ Danto (14-a jarcento) kaj Nikolao el Kuzo (15-a jarcento) konsideras Islamon kiel skismon aŭ herezon de Kristanismo. Do klara distingo inter Islamo kaj Kristanismo kaj rilatoj de ambaŭ estis rekonstruitaj nur poste, serve al alia celo ol historia vereco. Pli verŝajna aperas laŭgrada enplantiĝo de islamaj formoj en fekunda grundo de kongruaj ideoj post definitiva lukto inter diversaj partioj samlandaj.

Aŭ almenaŭ tion provas pruvi nia aŭtoro en sia menciita libro, kies aliajn ĉapitrojn ni trovas multe pli interesaj eĉ se malpli polemikaj.

Sed kiun interesas kulturo de perforte venkita popolo? Ĉu

Rikardo F. Albert Reyna.

1887 ★ 1987  
CENTENAIRE  
de la  
LANGUE INTERNATIONALE  
ESPERANTO

# CURSO BREVE DE ESPERANTO

## Kompleta konjugacio de AMI en la voĉo aktiva

### TIEMPOS SIMPLES:

Infinitivo	=	Ami
Participio	=	Aminta, amanta, amonta
Gerundio	=	Aminte, amante, amonte
Indicativo	=	Amas, amis, amos
Condicional	=	Amus
Imperativo	=	Amu

### TIEMPOS COMPUESTOS:

Infinitivo	=	Esti aminta (amanta, amonta)
Indicativo	=	Estas aminta (amanta, amonta) Estis aminta (amanta, amonta) Estos aminta (amanta, amonta)
Condicional	=	Estus aminta (amanta, amonta)
Imperativo	=	Estu aminta (amanta, amonta)

### TEXTO:

Jozefo estas leganta la ekzamenon de Esperanto. Li estas tre kontenta ĉar li komprenas, ke lernante la Internacian Lingvon oni favoras la rilatojn inter ĉiuj. La nacia lingvo ne sufiĉas; oni devas uzi Esperanton. Ja, la mondo devas esti tre kontenta pro tio ke la homo rajtas kaj kapablas paroli en la lingvon kreitan de D-ro Zamenhof.

### VORTARO:

Ekzameno	=	examen	uzi	=	usar
kontenta	=	satisfecho	ja	=	en verdad
ĉar	=	porque	mondo	=	mundo
kompreni	=	entender	devi	=	deber
lerni	=	aprender	pro	=	a causa de
internacia	=	internacional	tio	=	eso, aquello
lingvo	=	lengua, idioma	ke	=	que
kiam	=	cuando	homo	=	hombre
favori	=	favorecer	rajti	=	tener derecho
rilato	=	relación	kapabli	=	ser capaz
inter	=	entre	ĉiam	=	siempre
ĉiuj	=	todos	ĉie	=	en todas partes
nacia	=	nacional	krei	=	crear
sufiĉi	=	ser suficiente	D-ro	=	doctor
oni	=	uno, se			



PRAKTIKO POST LA KVARA LECIONO

Hodiaŭ ni lernis alian lecionon. En alia leciono Antono iris al la placo por akompani la leonon. Kiam li estis en la placo, la leono parolis:

- Kie estas Jozefo? Du homoj sufiĉas. Mi ŝatas, kiam Jozefo kaj vi estas en la placo. Ĉu vi komprenas?

Antono komprenas la leonon, ĉar li ŝatas ĝin. Li komprenas la lingvon de la leono. Unu leono sufiĉas por du homoj. Antono kaj Jozefo ŝatas, ke la leono kapablas paroli, ĉar tio estas tre agrabla por favori la rilatojn inter la homoj kaj la leono. La leono ĉiam parolas al la homoj, kaj ĉiuj estas kontentaj pro tio.

La homoj kaj la leono ja rajtas esti amikoj.

La leono iras ĉiam de la placo al la domo de Antono kaj de tie al la placo. Tie, en la domo de Antono, la leono ŝatas legi la librojn. Ĝi demandas:

- Kie estas la lecionoj de gramatiko? Mi ŝatas lerni gramatikon.

La leono eniras en la ĉambron de la libroj kaj parolas:

- Montru al mi la bluan libron!

La leono legas la libron kaj studas ĝin. La frato de Antono eniras en la ĉambron kaj demandas:

- Ĉu vi estas la leono amiko de Antono? Mi ŝatas vin. La leono parolas:

- Mi ŝatas la librojn de Antono. Mi legas nun la lecionojn de gramatiko. Hodiaŭ mi iros al la placo. Kaj vi? Ĉu vi iros al la placo? Mi tre ŝatas la placon. Akompanu min! La frato de Antono kaj la leono iris de la domo al la placo. Nun la du estas en la placo.

#####



# LINGVAJ DUBOJ

En nia kvina Kongreso, en Torokso, oni povis aŭdi plurfoje la demandon "kiel oni diras...?". Jen estas propono de respondoj al pluraj el tiuj demandoj.

Batido: Kirlaĵo. Ekzemple, fraga, ĉokolada kirlaĵo.

Integral: Integra, kompleta.

Chincheta: Prempinglo (laŭ Plena Ilustrita Vortaro, kiu prezentas ankaŭ "Desegnonajlo" kaj "Piknajlo"). Mi preferus "puŝnajlo".

Apotegma: Maksimo; spritaĵo. Kial ne "Apotegmo"?

Y pelillos a la mar: Kaj ni amik(iĝ)u; Kaj ni ne disputu; Kaj ni ne fendu harojn; Kaj ni ne reblovu la fajron.

Estar en ascuas: Sidi sur pingloj.

Bon vivant: Bonvivulo. Eventuale "Guisto".

Gourmet: Frandemulo.

Play-Boy: Flirtisto

Rikardo F.A.R.

Rekomendinda legaĵo:

Plena Ilustrita Vortaro

Kiel diri...? Praktika Esperanta Frazologio. Lentaigne.

Kredu min, sinjorino, de Cezaro Rossetti.

\*\*\*\*\*

## GRAVA AVERTO

ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) kiel sekcio de HEF, intencas oficialigi "Kolegio de Profesoroj de Esperanto" (oficiale rekonita de la Stato). La Ministerio pri Edukado petis de ni iujn dokumentojn, kaj do, ni bezonas tre urĝe sciigojn de tiuj esperantistoj (ILEI-anoj aŭ ne) kiuj atingis la diplomon pri "Esperantista Instruisto" de HEF kaj deziras esti membroj de la estonta Kolegio.

Bonvolu, se vi estas en tia situacio, sendi rapide al I.L.E.I. (Sol. 75, 41003 SEVILLA) jenon:

- nomon Kompletan
- adreson
- identigan numeron (D.N.I.)

Ci tiu afero estas tre grava por la oficialigo de la instruado de Esperanto en Hispanio.



## ESPERANTO KAJ ESPERANTISTOJ EN LA HISPANA POŝTMARKARO

La okazigo dum ĉi tiu jaro de la Jarcento de Esperanto estis la ĉefa kaŭzo kial tre diversaj landoj eldonis poŝtmarkojn honore al la internacia lingvo. La plej lasta kaŭzo ni ne scias ĉu ŝuldiĝas al la rezolucio de la UNESKO favore al Esperanto aŭ pli eble al la ne-lacigeblaj klopodoj de nombraj geesperantistoj, kiuj ĉu unuope ĉu grupe, petis oficiale al siaj registaroj la eldonadon de tiuj specialaj poŝtmarkoj. Tamen kio ni ja scias estas ke la Hispana Poŝtmark-servo, malgraŭ ĝi ricevis la peton de nombraj esperantistoj kaj eĉ la viziton de la Estraro de la Liceo de Madrido, fine ne eldonis la deziritan poŝtmarkon honore al nia lingvo en nia lando.

Aliaj ŝtatoj kiel Sovetunio, Jugoslavio, Belgio, Hungario, Bulgario, Brazilo, Kubo kaj eĉ la ne-konata Surinamo, dediĉis iufoje iun poŝtmarkon al Esperanto; nu, kaj Hispanio, kial ne ĉi tie? Ni ne scias ĝin. Sed tio kion ni ne rajtas forgesi estas ke kelkaj elstaraj samideanoj aperis iufoje en la hispanaj poŝtmarkoj, kvankam ne pro la fakto esti esperantistoj.

Preterpasante Alfonso la 13-an, amiko de Esperanto, kiu kompreneble aperis dum sia reĝado en multaj poŝtmarkoj, la unua esperantisto aŭ amiko de la internacia lingvo kiu aperis en poŝtmarko estis Francisco Pi y Margall, elstara respublika politikisto prezidanto de la Unua Respubliko, kiu verkis kelkajn artikolojn en revuoj favore al Esperanto dum la unuaj jaroj de nia jarcento, kaj al kiu la Poŝtmarka Servo de la 2-a Respubliko dediĉis poŝtmarkon, tiam sub valoro 5 centimojn sed hodiaŭ valoras preskaŭ mil pesetojn.

La dua poŝtmarko dediĉita al iu esperantisto estis eldonata en 1955 honore al Leonardo Torres Quevedo, unu el la plej elstaraj hispanaj inventistoj de nia jarcento kiu ankaŭ estis esperantisto. Kiel elpensisto oni devas elstari la konstruon de la transtraĵo super la Nia-

garo; la Ŝakludisto, kurioza maŝino kiu ludis finan parton de Ŝakludo inter reĝo kaj turo kontraŭ reĝo, kaj kiu ĉiam venkis; kaj ankaŭ la konstruo de la telekino (ĉu oni povus videti esperanto-radikon en tiu vorto?) Ĉi maŝino estis kapabla gvidi Ŝipon el la marbordo. La poŝtmarko kostis 50 ptojn, uzebla por la aera poŝto, oni eldonis du milionojn da ekzemplaroj kaj nuntempe iu el ili kostus pli ol 1.500 pesetojn.

En 1980 oni eldonis serion da poŝtmarkoj honore al la pioniroj de la hispana aeronautiko, bedaŭrinde oni forgesis en ĉi tiu serio memori al José Perogordo, unu el la hispanaj pioniroj de la aerostatoj kaj elstara esperantisto. La lasta menciinda poŝtmarko estis eldonata en 1983, kaj denove estis Torres Quevedo la omaĝita persono. Ĉi-foje per 38-pta postmarko de la serio "Europa", kie aperas kune kun sia vizago la transtrajno super la Niagaro. Pri la esperantista agado de Torres Quevedo indus verki seriozan studon, sendube li estis elstara kaj aktiva esperantisto, kaj eĉ partoprenis en la Internacia Konferenco pri la uzado de Esperanto en la Sciencoj kiu okazis en Parizo en Majo de 1925.

Tamen fine ni ne povas forgesi ke Hispanio eldonis nenium poŝtmarkon honore rekte al Esperanto, nek pro la okazigo en Hispanio de Universalaj Kongresoj, nek ĉi-jare okaze de la Jubileo de nia lingvo, malgraŭ oni ja eldonis poŝtmarkojn por festi aliajn jubileojn kaj aliajn internaciajn organizojn, kiel tiuj poŝtmarkoj dediĉitaj al Ruga Kruco, UN, Olimpika Komitato, Monda Turisma Organizaĵo, Skoltistoj aŭ tiuj okaze de la plej diversaj kongresoj, eĉ la plej kuriozaj kiel kongreso de tajloroj aŭ pli recente Internacia Konferenco pri la Merina Ŝafo.

Hispanio dediĉas ĉiuj jaroj specialan serion da poŝtmarkoj por memori jarcentojn. Ĉi-jare oni memoris la Jarcentojn de la morto de Narcis Monturiol, de la naskiĝo de Victorio Macho, de Francisco de Vitoria kaj de la fondiĝo de la Deŭsta Universitato. Ĉu oni ne povus utili ĉi fakon por memori ankaŭ Esperanton? sendube jes! Eble kio ja okazas estas ke la Esperanto-Movado ne havas sufiĉe fortan influon





Ĉe la necesaj instancoj. Tamen ni ankoraŭ disponas je alia okazaĵo por intenci ĝin. En 1990 okazas la Jarcento de la ekuzado en Hispanio de Esperanto, eble vi pensos ke temas pri artefarita okazaĵo, jes vi pravas! Tamen se tio kion ni pretendas estas trovi sufiĉe bonan "pretekston" por ke la Hispana Poŝtmark-Servo eldonos poŝtmarkon honore al Esperanto, ĉu ne povus esti ĉi tio inda okazaĵo? Eble jes!

Tio kion ni devus fari estas ekkontakti kun filatelaj rondoj, ili konas ĉi temojn pli bone ol ni. Ankaŭ estus oportune ne nur redakti peton al la Poŝtmark-Servo por ke Hispanio dediĉu poŝtmarkon al Esperanto sed ankaŭ prezenti ellaboritan desegnon studon ktp. kvazaŭ arkitekta projekto. Ĉi tiel eble la Poŝtmark-Servo komprenos ke temas pri tute serioza peto, ne forgesante, komprenoble, viziti ade Generalajn Direktorojn, Vic-direktorojn, Sekretariojn, ktp. Nur agante tiel ni havus eblecojn atingi la deziritan poŝtmarkon.

Nu, ĉi tiuj konsiloj apartenas nur al simpla samideano kiu, ne estante aŭtentika filatelisto, ja almenaŭ, kiel ĉiu normala esperantisto, kutimas konservi kaj gardi la poŝtmarkojn kiu estas algluitaj sur la kovertoj de la leteroj de liaj gekorespondantoj.

José María Rodríguez Hernández



# AMUZAJOJ

1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
36									11
35									12
34	1	25	8	19	29	34	12		
33	2	35	7	1	31	24	16		
32	3	36	4	28	15	11	6		
31	4	27	20	10	22	2	14		
30	5	9	18	33	21	5	32		
29	6	13	26	17	3	30	23		
28	27	26	25	24	23	22	21	20	19

- 1) Faciligis ies agadon
- 2) Kapvesto kun elstara ĉirkaŭrando
- 3) Alfabetan
- 4) Koncernanta aŭ konsistiganta vivon
- 5) Penoj por trovo
- 6) Ilo por pafi

Ĝia solvmaniero estas tre facila: ĉirkaŭ la ena kvadrato formiĝas proverbo, kiun oni povas legi ekde la numero 1 ĝis la 36. Solvante la vortojn de la kvadrato kaj translokante la literojn laŭ ilia numero, pleniĝas la frazo.

Pedro J. Gosálvez  
Kordovo.





# ESPERANTO



HABLAR ESPERANTO TIENE SU NATURAL ENCANTO

A QUE ESPERAS PARA APRENDERLO

